AVENO #51 - Verdaj Partioj & Esperanto - 2025

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazaĵoj, rilato de Verdaj Partioj kun Esperanto.

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

Se vi estas membro de verda movado (en senco de Verdaj Partioj) kaj ĝis nun ne estas membro de AVE bonvolu sendi ret-mesaĝon al la sekretario de AVE: AVE@verduloj.org
Gravas scii kiom ni estas.

Ni ja kunlaboras kun la Verdaj Partioj kaj iliaj kontinentaj kaj globala asocioj.

Europeangreens.eu dankis al ni por informi kaj varbi inter esperantistoj por la Verdaj Partioj - ĉikaze okaze de la baloto-kampanjo al la Eŭropa Parlamento:

*Dear Manfred,*

*I received the news that you have been sharing our campaign messages in Esperanto, thank you so much for your dedication and hard work* (kun verda koreto :)

*Best regards,*

***Alva Rödström (She/Her)***

*Volunteer Relations Manager - Europeangreens.eu*

= = =

2025-02-23 Verduloj en Germanio ricevis 11,6%
En la baloto al la federacia parlamento de Germanio Bündnis 90 / Die Grünen ricevis 11,6% de la voĉdonantoj - ili perdis 3,1%.
Estis du problemoj: ĉar la Liberala Partio forlasis la koalicion, necesis nova balotado. La Liberaluloj tre bremsis la laboron, ĉar ofte ne konsentis; ofte pro la limigo de ŝuldoj. Ankaŭ CDU ne volis helpi per siaj voĉoj.
Ili ne akceptis ke pro la ne-antaŭvidebla milito de Putin kontraŭ Ukrainio okazis kaj inflacio (pli altaj prezoj de nafto, ktp) kaj estis bezono elspezi multe da mono por helpi al Ukrainio.
La alia kaŭzo estis ke la Verduloj volis tre rapidan redukton de eligo da CO2 - por bremis la klimatan varmiĝon; kiu postulus multe da mono ankaŭ ĉe la civitanoj.
La paradoksa situacio: post la elekto kies rezulto estos koalicio de CDU kun SPD - oni decidis ke ankoraŭ la malnova parlamento decidu la akcepto al ege pli alta limigo da ŝuldoj ene de ĉ. 10 jaroj - kaj tie nepre necesis la akcepto de la Verduloj (kion ili donis post altigo de la parto por redukti la eligon da CO2).
Tiu antaŭa agado necesis, ĉar la ekstrem-dekstra partio ricevis pli da voĉoj, kaj certe ne akceptus altigon de la ŝuldoj, ĉar ili ne volas subteni Ukrainion.
- - -

2024-11-22/24 Eŭropa Verdpartia Akademio en Bruselo
Ili instruos kaj oni diskutos pri 3 temoj:
Green Deal (ekologio) kaj Social Deal (pri sociala justeco),
paco kaj sekureco, kaj demokratio.
Teorie AVE-anoj povus partopreni tie - prefere junuloj ĝis 30 jaroj.
- - -
2024-06-09 Rezulto de la elekto al la Eŭropa Parlamento
Greens/EFA - Verduloj kun Regionalistoj (inter ili Piratoj kaj ÖDP - germana ekologia partio) havis 72 sidlokojn.

Nun ili havas 53 - mi supozas ke iĝos pli kiam espereble denove aliĝos la t.n. Regionalistoj.
NL: plimulton gajnis la Ruĝ-Verda koalicio - gratulon ke ili kunlaboris, kaj superis la ekstrem-dekstrulojn.

DE: post la granda kresko antaŭ 5 jaroj nun okazis malkresko al 12 sidlokoj. Unu el la problemoj estas la nuna registaro el 3 partioj (Verduloj, Socialdemokratoj kaj Liberaluloj) - ofte estis malfermaj debatoj pri la ĝusta decido. Liberaluloj ne akceptas ĝeneralan limigon de rapideco sur aŭtoŝoseoj (la propono estis 130 km/h ), malgraŭ tio ke tiu estas en la koalicia interkonsento (se mi ne eraras). Krome ilia ministro pri financoj tute ne akceptas preni pli da kreditoj ol la permesataj de EU ĉ. 60%. Ni Verduloj argumentas ke kaj la klimato-krizo kaj la milito de Rusio kontraŭ Ukrainio kostas pli da mono, kaj bezonas pli urĝan agadon ol eblas kun la permesita mono. Kaj la forta enmigrado de azilpetantoj estas temo kiu ĝenas multajn homojn, ĉar nia kapacito da integriĝo estas limigita, same la infrastrukturo (loĝejoj, lokoj en lernejoj, financoj). Intertempe la nuna germana registaro agadas por limigi al alvenon, sed la reguloj de jur-ŝtato kaj niaj ĝeneralaj kristanaj vidpunktoj ne permesas pli rigidan baradon. Aparte en la orienta parto de Germanio pli multaj elektis la ekstrem-dekstra AfD, ĉar tie la homoj malpli havas sperton de paca kunvivado kun islamaj aŭ afrikaj homoj. Finfine, kelkaj tagoj antaŭ la voĉdono iu rifuĝinto el Afganio, kiu delonge ne ricevis asilon, mortigis policiston kiu defendis homon kiu protestas kontraŭ la politika islamo en Germanio.

**Volt** restas en la verda frakcio
Post la EU-balotoj dum kiu Volt iris de 1 seĝo al 5 (2 nederlandaj, 3 germanaj) okazis enpartia voĉdonado. El 25 mil membroj voĉdonis iom pli ol 5 mil. El tiuj, 87 % voĉdonis por resti en la frakcio de verduloj/Eúropa Libera Alianco, nur 11% voĉdonis por transiro al Renew (de Ronaldo Nobel)
- -
kaj entute:

La Frakcio de Verduloj kaj Regionalistoj (Libera Alianco) nun konsistas el 53 membroj el 17 landoj. Jen la ligilo - en 12 lingvoj - kie vi povas trovi la detalojn (partioj, landoj, komisionoj kaj delegitoj): https://www.greens-efa.eu/de/who-we-are/our-meps

- - - fino